

Kun Michel FRÉSARD: Interlukto de naturalismo kaj aŭtonomeco

Radioprelego de Claude GACOND, SRI, 1986

<http://www.esperanto-gacond.ch/SRI/Radiokasedo-164/Radiokasedo-164-5-86-A-1019-Claude-GACOND-Michel-FRESARD-Interlukto-de-naturalismo-kaj-aŭtonomeco.mp3>

Cl.- Parolas Claude Gacond kaj Michel Frésard nome de Svisa Radio Internacia.

En pasinta diskuto ni konstatis, ke la nuntempa interlukto de la nomoj, Unuiĝintaj Nacioj kaj Unuiĝinta Naciaro spegulas lingvo-fenomenon karakterizan por Esperanto. Kiam oni devas krei novan vorton, oni ĝenerale imitas la nacilingvan formon. Sed poste, se la kreitaĵo ne korespondas al la spirito mem de Esperanto, kiu volas ke la formo kaj la signifo kongruu, tiam aŭtomate naskiĝos pli taŭga vorto. Dum certa tempo pli malpli viglas la interlukto de la vort-duopo, ĝis kiam la lingve taŭga sin trudas.

MF.- Koncerne la formulon ‘Unuiĝintaj Nacioj’, mi memorigu, ke ĝi volis kopii la nomon ‘Nations unies’, ‘United States’, kiu estas plurala en la naciaj lingvoj kaj kiu povas signifi ‘unuiĝo de nacioj’, kiuj unuope unuiĝis aŭ estis unuiĝitaj aŭ ‘unuiĝo de nacioj’, kiuj kune unuiĝis sin. Laŭ la pakto de organizaĵo de Unuiĝintaj Nacioj oni scias, ke ne temas pri unuiĝo de nacioj unuope unuiĝintaj, sed de nacioj kune unuiĝintaj. La pioniroj, kiuj unue tradukis la Ĉarton de UN, elektis do la formulon ‘Organizaĵo de Unuiĝintaj Nacioj’. Sed baldaŭ montriĝis, ke la koncernan juran nocion en Esperanto oni emas formuli alimaniere per la formulo ‘Organizaĵo de Unuiĝinta Naciaro’. Oni tuj scias, ke la naciaro unuiĝis kaj tio lasas al la formulo ‘Unuiĝintaj Nacioj’ la signifon aro da nacioj, kiuj unuope unuiĝis. Se oni atente ekzamenas la interlukton de la du formuloj, oni konstatas, ke la nomo ‘Unuiĝinta Naciaro’ konkeras poziciojn, kiujn unue okupis la nomo ‘Unuiĝintaj Nacioj’.

Cl.- Tio estas tre videbla okaze de plurtaga seminario. Unue la prelegistoj fidelas al la memelektita formulo. En certa momento leviĝas la demando, kiu el ambaŭ formuloj reale konvenas al Esperanto. Se tiu diskuto povas libere disvolviĝi, ĝi ĝenerale malkovrigas, ke la formulo ‘Unuiĝinta Naciaro’ estas unusignifa, dum la formo ‘Unuiĝintaj Nacioj’ estas dusignifa, kiel fakte en la naciaj lingvoj. La spirito mem de Esperanto celas la unusignifecon kaj la kongruon inter la formo kaj la signifo. Tiel la singulara ‘Unuiĝinta Naciaro’ sin pli kaj pli trudas, despli ke la singulara pronomo ‘ĝi’ estas uzebla.

MF.- El seminario okazinta en La Chaux-de-Fonds oni rimarkis, ke la prelegintoj, kiuj estis ĝenerale uzintaj la esprimon ‘Organizaĵo de Unuiĝintaj Nacioj’ iom post iom adoptis la formon ‘Organizaĵo de Unuiĝinta Naciaro’ dum la diskutoj.

Cl.- Mi havas la senton ke tiu evoluo de kopio-nomo al aŭtonoma formulo bone spegulas la ĝeneralan tendencon, kiu ekzistas en Esperanto. Unue oni imitas konscie aŭ nekonscie la nacilingvan modelon, sed poste, se tiu modelo estas plursignifa, neklara, naturalisma, Esperanto emas mem forĝi pli adekvatan formon. La evoluo iras de la naturalismo al la aŭtonomeco.

MF.- Ĉu vi povas doni ekzemplojn de tiu evoluo?

Cl.- Zamenhof utiligis la vorton ‘civilizacio’, sed nun ni diras ‘civilizo’. Tie ĉi Esperanto eliminis la pseŭdosufikson ‘aci’. Oni rimarkis saman tendencon, kiam oni ekdiskutis pri la civiliza problemo, kiu ricevis la nomon ‘polucio’. Sed nun la bonaj aŭtoroj parolas pri

‘poluo’. Lasante al la formo ‘polucio’ ties signifon de nevola elfluo de spermo sen koito, kiun ĝi posedis antaŭ ol oni parolis en la franca kaj aliaj nacilingvoj pri ‘pollution de l’air et de l’eau’, kion oni unue naturalisme tradukis per ‘polucio de la aero kaj akvo’. Nun oni dirus: ‘aera kaj akva poluo’ kaj formiĝis la verbo polui.

MF.- Min ofte trafis la tri vortoj ‘federi’, ‘federacio’ kaj ‘federala’. Ĉu fakte ni ne troviĝas antaŭ tipe naturalisma fenomeno ?

Cl.- Jes. Kaj tiu triopo ĉefe rezistis al la emoj mem de la lingvo ĉar tiujn vortojn ĉefe manipulas juristoj. La juristoj kutimas doni signifojn al la vortoj, sen tro okupiĝi, ĉu la formo korespondas al la signifo. Tio konvenas al la lingvoj latina kaj okcidenteŭropa, sed tre verŝajne ne al Esperanto. Tial oni povas antaŭvidi, ke eĉ la triopo ‘federi’, ‘federacio’ kaj ‘federala’ evoluos al unueca formo aŭtonoma. Tre verŝajne de la verbo ‘federi’ oni generos la vortojn, kiuj anstataŭos niajn nuntempajn ‘federacio’ kaj ‘federala’. En la franca lingvo ‘fédération’, kiu naskis ‘federacio’-n en Esperanto signifas ĉu ‘federiĝo’, ĉu ‘federo’, ĉu eĉ ‘federigo’. Kaj la francan adjektivon ‘fédéral’ oni ne nur povas traduki per la esperanta ‘federala’, sed ankaŭ per la adjektivoj ‘federa’, ‘federiĝa’ kaj ‘federiga’.

MF.- En Esperanto estas fakte multe pli preciza.

Cl.- Kaj multe pli nuancema, sed kiam kunluktas naturalismaj formoj, kiel kun la triopo ‘federi’, ‘federacio’ kaj ‘federala’, oni perdas tiun precizecon kaj nuancemon, preferante blindan kopion de la nacilingvaj kutimoj. Sed ĉiam alvenas la momento, kiam venkas la emo al aŭtonomeco de Esperanto. Eĉ se ĝi malplaĉas al juristo. Kiam mi devis traduki klarigojn pri la sindikata vivo en Svislando, mi vigle sentis, ke la esprimo ‘laborista federiĝo’ pli bone konvenis ol la naturalisma ‘federacio de la laboristoj’. La vorto ‘federiĝo’ memorigas, ke la laboristoj mem federis sin kaj rifuzis la federigon, kiun mastroj volis trudi al ili. En la franca ambaŭ nocioj esprimiĝas nur per ‘fédération’ kaj samas en Esperanto, kiam oni diras ‘federacio’. Svislando estas fakte ‘federiĝo’ de kantoj, dum Jugoslavio estas federigo de regionoj, kiuj ne mem celis tiun ĉi federigon. Tial daŭre ekzistas emo eliri la federigon, kiu estis trudita.

MF.- Ĉio tio montras ke Esperanto troviĝas en plena evolufazo.

Cl.- Jes, kaj tio kreas situacion, kiu ne estas favora al ĝia utiligo en la juro kaj eble en medicino. Verŝajne mankas en nia Esperanto-socio la dimensio de la supera instruado, en kiu oni povas instrui pri la memoj propraj al la lingvo, kiujn oni devus respekti, kiam oni forĝas novaj vortojn. Nur la novismoj, kiuj kongruas forme kaj signife kun la koncerna nocio disvolviĝas naskante vort-familion. La aliaj estas atendaj solvoj. La Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto emis registri naturalismajn formojn kiel ‘komputero’, ‘ĉaleto’, ‘alumeto’, ‘raketo’, sed la vivo preferas ‘komputi’, kiu generas ‘komputilo’, ‘komputisto’, ‘komputado’, ‘komputilaro’ kaj ankaŭ ‘ĉaledo’, ‘alumedo’, ‘rakedo’, kiuj estas pli aŭtonomaj.

MF.- Kiam naskiĝis la sonbendregistriiloj, kiujn oni nomis ‘cassette’, la esperantistoj unue diris ‘kaseto’, sed tre baldaŭ ili preferis la reale esperantan vorton ‘kasedo’.

Cl.- Vortaro kiel PIV fakte bremsas tiun ĉi lingvan evoluon kaj kaŭzas, ke formiĝas du lingvoj: tiu, kiu fidelemas al la vortaro kaj tiu, kiu obeemas la spiriton de la lingvo. En supera instruado de Esperanto oni atentigas la studentojn pri tiu ĉi dueco lingva.

MF.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Claude Gacond kaj Michel Frésard diras al vi: Ĝis la venonta sabato!

*Kopirajto © Claude GACOND www.esperanto-gacond.ch
Prilaboris: [Stefano KELLER](#), januaro 2014*